

EDITORIAL

Nouvelle année, nouvel espoir ! Au seuil de la nouvelle année, les bons vœux ne manquent pas . Toutefois, les nouvelles de notre monde n'ont rien de réjouissant : conflits, terrorisme, violence, menace de guerre (en Irak), pollution éhontée, perturbations climatiques, faim, etc, et nous sommes souvent impuissants même si, comme l'affirmait une inscription sur le Mur de Berlin : beaucoup de petits hommes qui font beaucoup de petites choses peuvent changer la face du monde .

L'Europe va changer de visage aussi . De 15 membres nous allons passer à 25 . Il est bon que notre continent connaisse enfin la paix et que les nations travaillent de concert . La réalité est différente : on vient de le voir avec la Pologne, qui préfère commander des avions aux USA et les différences sont importantes entre les membres actuels et futurs; c'est ce qu'a découvert l'Allemagne dont la réunification peine encore .

Au delà des problèmes sociaux et économiques, on peut aussi s'interroger sur la question linguistique . Comment les Européens vont-ils communiquer ? Vont-ils avoir recours au Globish (l'anglais simplifié de la mondialisation) ? Quand envisagera-t-on une solution simple, plus équitable et plus efficace ?

Ne nous contentons pas d'espérer, travaillons aussi dans ce sens ! Beaucoup de petits hommes ...

Bonne année !
Jean Hénin

Nova jaro, nova espero ! Sojle de nova jaro ne mankas bondeziroj . Tamen la novaĵoj pri nia mondo ne estas ĝojigaj : konfliktoj, terorismo, perforto, minaco de milito (en Irako), senhonta poluciado, klimataj perturboj, malsato, ktp, kaj ni estas ofte senpovaj eĉ se, kiel asertis surskribo sur la Berlina Murego : multaj etaj homoj, kiuj faras multajn etajn aĵojn, povas ŝanĝi la vizaĝon de la mondo .

Novan vizaĝon ankaŭ alprenos Eŭropo . Anstataŭ dekkvin membroj ni estos dudek kvin . Bone, ke nia kontinento fine konas pacon kaj ke la nacioj kunlaboras . La realo estas alia . Oni ĵus konstatis kun Pollando, kiu preferas mendi aviadilojn al Usono , kaj la diferencoj estas gravaj inter la nunaj kaj la estontaj membroj, kiel spertis Germanio, kies reunuiĝo ankoraŭ penas .

Krom sociaj kaj ekonomiaj problemoj, oni povas sin demandi pri la lingva problemo . Kiel komunikos inter si Eŭropanoj ? Ĉu ili uzos "Globish" (la simpligitan anglan lingvon de tutmondigo) ? Kiam oni antaŭvidos simplan, pli justan kaj pli efikan solvon ?

*Ni ne nur esperu, ni ankaŭ laboru en tiu direkto
Multaj etaj homoj...*

Bonan Jaron !
JH



KOTIZOJ

Neniu estas izolita Por la defendo kaj progresigo de esperanto, estas rekomendinde aliĝi la lokan grupon, la regionan federacion, la nacian kaj la internacian asociojn . Ekzistas diversaj tarifoj kaj eblecoj . Jen kelkaj :

Personne n'est isolé . Pour la défense et la promotion de l'espéranto, il est recommandé d'adhérer au groupe local, à la fédération régionale, aux associations nationale et internationale . Il existe plusieurs tarifs et possibilités que voici :

UEA/UFE : UEA = Universala Esperanto Asocio . Membro de pli ol 30 jaroj kun Jarlibro (kodo UMJ) : 20^E

Membro de malpli ol 30 jaroj kun Jarlibro + abono al "Esperanto" (UMA) : 50^E Membro kun la unua parto de la Jarlibro (UMG) : 8^E Dumviva membro (membre à vie) kun Jarlibro kaj "Esperanto" (UDM) : 1250^E Dumviva membro kun Jarlibro (DMJ) : 50^E .

UFE = Unuiĝo Franca por Esperanto / Union française pour l'espéranto = Espéranto-France = filio de UEA .

Aktiva membro (ricevas "Le monde de l'espéranto" kaj Okazas (FMA) : 52^E (35E por studentoj kaj senlaboruloj / FME) .

Aktiva membro (sen abononj) (FSM) 30^E aŭ 20^E (FSE) por gestudentoj kaj senlaboruloj

Paro (aktivaj membroj) : 82^E (PK1/2) Dumviva membro (FDM) : 1040^E .

JEFO (Junulara E° Franca Organizo) kaj TEJO (Tutmonda) por membroj ĝis 30 jaroj

Jefo : aktiva membro kun la revuoj (JSM) 30E aŭ 15E (JMM) por studentoj . Aktiva membro de UFE kaj JEFO

(JMA) : 52^E aŭ 35^E (gestudentoj, gelernantoj, senlaboruloj) . *Petu la kompletan aliĝilon de SFS* . Adreso de Esperanto-France : 4bis, rue de la Cerisaie 75004 Paris (Tel 01 42 786 886 Fax : 01 42 780 847 <esperanto-france@esperanto.org>*

SAT/SAT-AMIKARO : SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda (Anationalistes) -67, Avenue Gambetta 75020 Paris

Membro abonanto : 48E (24E por samfamilianoj, gejunuloj ĝis 25j. kaj senlaboruloj) . Abono al Sennaciulo : 50^E

Sat-Amikaro (francparolantaj amikoj de Sat) : 134, Bd Vincent Auriol 75013 Paris aŭ 67, Avenue Gambetta 75020

Kotizo kun abono : 32^E ; subtenkotizo : 64^E ; gejunuloj : 16^E . Nura abono : 29^E .

VIVO DE LA GRUPOJ

BEZIERS : Kiel kutime, ripeto de la datoj de la venontaj kunvenoj : 11a de januaro (ĝenerala kunveno), 8a de februaro, 8a de marto, 12a de aprilo, ĉiam je 14h30 en Domo de Asocioj . Ni esperas, ke vi venos, ĉar estas malfacile organizi ion, kiam mankas multaj grupanoj .

La **Zamenhof-tago** okazis en decembro kun 33 partoprenantoj . Preskaŭ la duono venis de aliaj urboj aŭ eĉ departementoj . Ni gratulas kaj dankas ilin . Post bona manĝo, la distra posttagmezo estis sukcesa dank'al la aktiva partopreno de pluraj gelernantoj, kiuj legis poemojn, monologojn . Apartajn gratulojn al Josée, pro la rimarkinda monologo, kiun ŝi prezentis al ni . Kun plezuro, ni reaŭdos ŝin je alia okazo .

Tiaj kunvenoj redonas kuraĝon por daŭrigi la laboron en esperanto . Dankon al ĉiuj bonvolemluloj .

Yves Nicolas konfirmis la viziton de **S-ro Bronstejn (Ruso)** . Li ricevis la vizon por sia restado en Germanio, Belgio kaj Francio . Li estos en Béziers la 21an, 22an, 23an de januaro . Fakte la ĉefa ĉeesto estos la 22an (merkredon), ĉar li venos de Tuluzo la 22an, kaj foriros al Romans la 23an . Do, tamen rapida vizito sed tio montros al "novuloj" la utilon de esperanto, kaj estos okazo kontroli la lingvan scipovon . Ni sendos invitilojn kaj esperas, ke la homoj (grupanoj aŭ ne) venos multaj .

NDLR : la grupo ankaŭ aktive preparas dokumentojn por la **Sat-Amikara kongreso en Cap d'Agde (Pasko) kaj tute speciale la 20an printempan staĝon en Vias (mezmaĝe)** . Vidu la detalojn sur la sekvantaj paĝoj kaj aliĝu frue !

GARD : Kvankam ne alvenas multaj informoj pri tiu departemento, ni eksciis pri la prezento de E° en Nîmes al dekkvino da personoj (en decembro) . Ĉu la tiea grupo revigligos ?

LOZÈRE : En la 5a festivalo de E°-videofilmoj en Maribor , okazinta en novembro, Céline Bernard (filino de Francis k. Monique) ricevis la unuan premion en la arta branĉo pro dekminuta filmo "La tukoj" kun geaktoroj el la Tuluzo grupo . Gratulojn !

Esperanto-semajno : Post restado de esperantista paro el Antverpeno (kadre de "Pasporta Servo") estis decidite organizi en septembro 2003 tutan semajnon por malkovri la regionon . Ne mankas allogaĵoj : Tarn-kanjono, altebenaĵoj, besto-rezervejoj (lupoj, bizonoj, vulturoj), Aubrac kaj Monto Aigoual, fromaĝkejoj (Roquefort), rokkaosoj, grotoj, varmegaj fontoj (Chaudes-Aigues), historiaj lokoj (Conques kaj la vojo de la pilgrimantoj), ktp . La unua vizito estos en Vulcania, la nova parko pri vulkanoj (proksime de Clermont-Ferrand) la 5an de septembro kaj la lasta en Le Puy en Velay la 14an de septembro pro la grandaj mezepokaj festoj tie tiam . Partoprenos inter 12 kaj 15 Geflandroj . Estos bonvenaj esperantistoj de nia regiono por unu aŭ pluraj tagoj . Sola kondiĉo : ne krokodili (laŭeble ne paroli en la franca) . Informas Jean Hénin (adreso sur la lasta paĝo) . *Do ne mankos okazoj en nia regiono por praktiki la internacian lingvon en 2003 : semajno en Vias en Majo, migrad-semajno en Valmanya -66- (teorie) kaj Internacia semajno en Sète, turisma semajno en La Canourgue...PARTOPRENU !*

MONTPELLIER :

Kunvenoj : En novembro ĉeestis 20 homoj . Oni rimarkis tri novajn gelernantojn kaj la revenon de kelkaj konatuloj, tio kun granda plezuro ! Annick Tora prezentis la Z-festojn en Béziers (7/12) kaj Toulouse (14/12) . Pro tiuj festoj, oni decidis ŝanĝi la daton de la decembra kunveno al la 30a de decembro (partoprenis ankaŭ dudeko da homoj) . Sro Capus informis pri la dissendo de SFS al proksimume 130 adresoj en nia regiono . Sro P. Matinez havas kurson en Lattes kun 4 novaj gelernantoj . Jeanne Bès prezentis interesan gazeton el Katalunio en 5 lingvoj, eldonitan de la Turismoficejo en Barcelono (la kataluna, la kastilia, la esperanta, la angla kaj la germana... sed mirinde ne en la franca !) .

La kunveno finiĝis per frandado de (peco da) svisa ĉokolado, donaco de Sro Lentaigne . Sekvis komuna amika tagmanĝo (raportis R. A.)

Montpellieranoj vojaĝas kaj partoprenas ! Iuj el ili partoprenis la Z-feston en Béziers (vidu ĉi-supre), aliaj en la Z-festoj en Toulouse kaj Avignon (legu la raportetojn ĉi-poste) Gratulinde kaj imitinde !

La 18an de Aprilo, Georges Kersaudy (vidu la anoncon de la unua paĝo) prelegos en Montpellier (vespere) . Informu kaj venigu viajn amikojn, kiuj interesiĝas pri la lingva problemo kaj la estonteco de Eŭropo, eĉ se ili ne parolas esperanton . La prelego estos en la franca por la ekstera publiko . Ni kalkulas sur vi ! (Informoj ĉe 04 67 69 11 32)

Datoj de la kunvenoj en 2003 : 11a de januaro - 8a de februaro (ĝenerala kunveno) -15a de marto -12a de aprilo - 10a de majo - 7a de junio . Bonvolu noti !

Pri la Z-tago en Avignon : La 15an de decembro ok membroj de la Montpelliera "Kultura Esperanta Asocio" partoprenis la Zamenhofan tagon en Avignon . Ili plezure aŭskultis interesan paroladon de A. Cherpillod pri "la diversaj kalendaroj tra la historiaj tempoj" .

Post bona kunmanĝo, la partoprenantoj ĉeestis distran posttagmezon : kantoj kaj skeĉoj inter kiuj Josée tre bone partoprenis . Ni renkontis amikojn . Tre agrabla kaj simpatia etoso . Ĝis venonta jaro ! (raportis J. D.)

Pri la Z-tago en Toulouse : (vidu sur la sekvanta paĝo raporton el "La Krokodilo")

Zamenhof-festo en Tuluzo : raportas J. Caubel

La 14an de decembro kuniĝis kvindek esperantanoj okaze de la tradicia naskiĝfesto de la iniciatinto de esperanto. Post komuna tagmanĝo apud glaciglitejo, ni spektis valoran teatran kaj muzikan prezentadojn.

Alvenis gesamideanoj eĉ de malproksime, ekz. de Cahors, de Pau, de Perpignan. Montpellierano Thierry Saladin rapide montris glurubandojn por reklami esperanton, lingvon eŭropan. Li vendas ilin por glui sur vian veturilon.

Post komuna restoracia manĝo, ni iris apuden al la haloj de « Comité d'Entreprise » de la Fervojoj. La organizintaj asocioj (EKC, Fervojoj, Regiona Federacio, kaj EUROKKA) prezentis librojn kaj diskojn.

La posttagmeza spektaklo konsistis el teatraĵo kaj kantoj kun gitar-akompano. Pasintjare kreis Arno Lagrange Teatran Trupon en Tuluzo (TTT). La aktoroj ne estas profesiaj kaj ne perfekte regas esperanton, sed kuraĝas tiel plu lerni ĝin. Ili jam ludas sian duan teatraĵon! Kaj kun sukceso, ili bone gestas, ĝuste akcentas la vortojn. Tiun ĉi verkon de Labiche prezentos la trupo en Cap d'Agde la 22an de aprilo 2003, dum la SAT-Amikara jara kongreso.

Poste kantis Thierry FAVERIAL kun propra gitar-akompano. Li prezentis tre diversajn kanzonojn, amkantojn kaj aliajn, de li mem aŭ de francaj poetoj, ekz. Jean Richepin; ankaŭ alilandajn kantojn. Ĉiujn kantojn prezentis unue Brigitte Faverial. Tamen ne ĉiuj spektantoj komprenis la tekstojn, des pli ke kelkaj ne estis esperantistoj.

Je la sesa horo disiris la pli ol kvindek partoprenintoj, post tiu ĉi agrabla festo kaj bonkvalita kultura parto.

PYRÉNÉES-ORIENTALES

La ĝenerala kunveno de la grupo de Perpignan okazis la 23an de oktobro 2002; ĉi-jare ĝi iom malfruis pro diversaj kialoj: libertempo de la prezidanto Sro Llech-Walter, translokiĝo de la sekretario, ktp. Partoprenis dek geesperantistoj.

Kiel ĉiufoje: financoj, organizado de la kursoj kaj diversaj demandoj. La kursoj okazas je la samaj tagoj kaj horoj:

Ĉiumarde: perfektiga kurso kun Sro Bénazet; ĉiusabate inter la naŭa kaj deknua, dum la deĵoro de Sro Gérard-

Voinçon: inicadkurso. Tamen povas okazi inicadkurso kun Sro Joly, laŭ la libera tempo de la gelernantoj.

Ni konstatis en 2002, ke pli da homoj vizitis la kulturan centron je sabato matene dum la libertempo.

La 5an de aprilo disvolviĝos kiel lastjare la "Festa des langues"; ni partoprenos.

La kruco de Sant Jordi, atribuita al Sro Llech-Walter antaŭ nelonge, estas la plej grava honorigo de la "Generalitat" de Katalunio. Tiu medalo rekomencas tiujn, kiuj laboris favore pri verko skribita en la kataluna lingvo. Gratulojn!

Kiel anoncote lastfoje, C. Pinard prezentis esperanton al la asocio Alec de Prades la 24an de oktobro. Bona partoprenantaro. Se la prezento daŭris 45 minutojn, la debato poste daŭris du horojn. Do, granda intereso por E°.

Ĉi-poste diversaj artikoloj aperintaj en la gazetaro de P-O. Sendu al SFS, se io simila ekzistas en via departemento!

L'Esperanto en Conflent

Christian Pinard, dans le cadre des Amis de la laïcité en Conflent, a convié dernièrement le public à une découverte de la langue espéranto.

Cette soirée a permis à une vingtaine de personnes de se familiariser aux rudiments de cette langue universelle. Un débat a mis en évidence l'idée humaniste, fraternelle et généreuse qui imprègne l'espéranto. Une démarche qui s'est concrétisée, à l'issue de cette rencontre, autour du pot de l'amitié. Cette rencontre aura sans doute fait de nouveaux adeptes à l'Association Esperanto, Conflent.

Pour tout renseignement sur le club contacter le 04 68 05 54 41.

Aux confins de l'Esperanto

"L'espéranto est une langue planifiée, pour faciliter l'intercompréhension des personnes de divers peuples en permettant le droit à l'égalité culturelle. Il est plus facile à apprendre que n'importe quelle langue nationale". Voilà ce que nous disent les promoteurs officiels de cette langue, mise au point par le médecin varsovien Louis Lazare Zamenhof en 1887.

Aujourd'hui il y a des espérantophones dans environ 120 pays. Leur nombre précis n'est pas connu, mais toujours est-il que dans le Conflent, un internaute a décidé de passer à l'action. Christian Pinard a ainsi créé un site (perso.wanadoo.fr/esperanto-conflent) à la fois pour faire découvrir aux non-connaisseurs ce qu'est l'espéranto, mais aussi pour faire une présentation de cet-


te micro-région qu'est le Conflent aux espérantistes du monde entier.

Le site regroupe une mine d'infos sur tous les aspects de cette langue et propose des liens pour apprendre la langue.

Cours d'espéranto

Ce mardi, cours de langue internationale espéranto; à 15 h perfectionnement; à 16 h, cours première année. Le Centre culturel des P.-O. organise des cours par correspondance, cours d'initiation pour tout public. Les personnes qui désirent s'informer sur la langue internationale peuvent consulter le site de la Fédération Languedoc-Roussillon: <http://www.chez.com/esperantosf>. Le siège de l'association est ouvert tous les mardis de 14 h 30 à 17 h, tous les samedis, de 9 h à 11 h, au 72, avenue du Général-de-Gaulle à Perpignan. Tél. 04 68 34 54 38 ou tél./fax 04 68 55 51 77.

Extraits de "L'Indépendant"
-Prades: 21/11 et 22/12
-Perpignan: 17/12



Tous courriers et renseignements à
CBE
Christian HERBETTE
 Domaine des 7 fonts
 Ancien passage à niveau
 F - 34300 AGDE
 Tél / fax
 0 467 218 661
 Retadreso
 Chrizo@worldonline.fr

FRAIS DE SEJOUR
A) - Adhésion: 40 € p.pers. jusqu'au 30avril
 ou **50 €** p.p.après date ci-dessus.
Adhésion gratuite pour les moins de 25 ans
B) - Pension complète pour la semaine
245 € par personne draps fournis
Total (A+B) 245 + 40 = 285 € avant le 1 mai
245 + 50 = 295 € après le 1 mai
Acompte : 80 € - inclus l'adhésion -
 p.pers. avant le 1 mai
: 82 € - inclus l'adhésion -
 p.pers. après le 1 mai
Place camping : 12 € p. jour **Repas 11€50**

Piscine chauffée à votre disposition: n'oubliez pas vos maillots de bains!...
 La mer à 5km, Agde 8, Béziers 10.

Détacher et envoyer

Fédération Languedoc-Roussillon
CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO
 Stage du 14 au 21 mai 2003
BULLETIN D' INSCRIPTION

Prénom :
 Nom :
 Adresse 1
 Adresse 2
 Code postal : Ville
 Numéro de tél :

Je participerai et arriverai:
(mettre une croix dans la case choisie)
 1° directement à la Dragonnière à VIAS
 par mes propres moyens
 2° par le train en gare de Béziers
 le .. mai 2003 à ... h...
 ou d' Agde le .. mai 2002 à. ... h...
 un chauffeur m'attendra en gare.
 3° seul(e) en compagnie
 de

(à 3° répondre dans les deux cas: 1° et 2°)
 je désire être en compagnie
 de *(couple ne pas remplir)*
 Avec cette adhésion, vous trouverez un chèque
 de € Acompte ou totalité :

chèque à libeller au nom du
CERCLE BITERROIS d'ESPERANTO

Adresser à
C.B.E.
Christian HERBETTE
 Domaine des 7 Fonts
 Ancien passage à niveau
 34300 AGDE

Important !
 Niveau du cours :

Je désire suivre le cours
 Débutant Progressif
 Conversation Supérieur
 et passer l'examen :

1e degré 2e degré 3e degré
 □□□□□□□□□□□□□□□□

Important !
 Avez vous une proposition à nous faire pour animer
 une soirée : elle sera la bien venue .
 Vous avez une demande particulière sur le séjour,
 l'espace ci-dessous vous est réservé :

.....

Le domaine de la Dragonnière se situe entre Béziers et Agde sur la route nationale N112 . Le lieu est calme, propice à l'étude .
 Cette année de nouvelles dispositions adoptées, entre la direction de l'établissement et notre responsable, Christian, nous permettront nettement d'améliorer la tranquillité des salles de cours.

CONTACTS AVEC LES DÉPUTÉS DE LA RÉGION ET LES MINISTÈRES :

Suite à la lettre du candidat Jacques Chirac (SFS 161) et de la campagne lancée par France-E° auprès des députés afin de promouvoir l'espéranto dans le système éducatif, nous avons écrit aux 21 députés de la région. A ce jour 12 (donc la moitié) ont répondu, plusieurs ayant déposé une question écrite auprès du gouvernement (ministère de la jeunesse, de l'éducation nationale et de la recherche, titre complet dudit ministère). Nous avons bien sûr mentionné les promesses de M. Chirac et joint un dossier sur la réalité de la construction européenne, les difficultés de communication, sur les menaces d'hégémonie de l'anglais (dont l'affaire récente de l'étiquetage des produits de consommation), la nécessité de préservation des langues, sur les possibilités de l'espéranto (extrait du livre de M. Kersaudy) ... L'aide de chaque député était plus spécialement sollicitée pour l'inscription de l'espéranto comme option au baccalauréat et l'expérimentation comme propédeutique dans quelques classes du primaire (il n'a jamais été question de "généralisation" comme l'indique la réponse ministérielle; il semble que tout demander d'un coup soit la meilleure chance d'insuccès).

Réponses par départements :

- Aude (3 députés/3 réponses : J-C. Perez, J. Bascou, J-P. Dupré, tous trois PS) . Une réponse commune nous a été adressée, une question a été déposée (référéncée au nom de M. Perez) .
- Gard (5 députés/2 réponses) . Damien Alary (PS, président du Conseil Général du Gard) a déposé une question écrite. Max Roustan (UMP, maire d'Alès) est favorable à la défense du français et des langues traditionnelles face à l'hégémonie de l'anglais et estime qu'il faut "trouver une solution qui peut notamment passer par l'espéranto" .
- Hérault (7 députés/ 2 réponses) . Christian Jeanjean (UMP - maire de Palavas) est intervenu auprès de M. Ferry et de Mme Lenoir (ministre déléguée aux affaires européennes) et nous a transmis leurs réponses . Robert Lecou (UMP, maire de Lodève) a accusé réception du courrier et promis d'être attentif .
- Lozère (2 députés/ 2 réponses) . Francis Saint-Léger est intervenu auprès du ministre de l'éducation (réponse transmise) et du ministre de la culture et de la communication . Pierre Morel a déposé une question .
- Pyrénées Orientales (4 députés/3 réponses) . François Calvet (UMP, vice-président du conseil régional) et Daniel Mach ont déposé chacun une question écrite . Henri Sicre (PS) est conscient des menaces des langues nationales et régionales (se dit défenseur du catalan) et a transmis à son groupe parlementaire .

Les réponses de M. Ferry* sont toutes identiques . Les propos péjoratifs ont été soigneusement évités ("langue artificielle, manque de culture...") . Il est rappelé que le bac offre une palette de 22 langues (ce chiffre varie suivant les ministres !), donc notre système "offre le choix le plus ouvert", que l'apprentissage des langues est une priorité et "vise, au terme de la scolarité obligatoire, la maîtrise d'au moins deux langues vivantes en plus de sa propre langue" . On croit rêver... ou le mot "maîtrise" n'a pas le même sens au ministère de l'EN...

Mme Lenoir* signale que la Commission européenne ne demande pas l'étiquetage en anglais (la presse a dû se tromper) et que son gouvernement "attache une importance considérable à la préservation du français dans les institutions européennes". "La vraie richesse de l'Europe est la diversité, linguistique autant que culturelle et construire l'Europe n'est pas possible sans une recherche active de cette diversité" . On ne saurait mieux dire .

Au niveau régional, on peut être satisfait du nombre de réponses . Sur le fond, chacun jugera . Au niveau national, 10% des députés contactés ont déposé une question écrite, le Journal Officiel fera paraître la ou les réponses et M. Ferry saura que l'espéranto existe et persiste . Nous regrettons la non-réponse de certains députés, par exemple de François Liberti (CR -ex-maire de Sète) qui a visité l'Universala Kongreso de Montpellier et qui est le député d'Agde (prochain congrès de Sat-Amikaro) . Si votre député n'a pas donné signe de vie, vous savez ce que vous pouvez faire : Esperanto estas ĉies afero !

Notons, dans un autre registre, celui des députés européens dont 18 sur 87 en France sont à différents degrés favorables à l'espéranto, que deux d'entre eux ont proposé l'an dernier UEA pour le prix Nobel, dont Yves Pietrasanta (Verts), ancien maire de Mèze .

Bruno Bourg-Broc, député UMP de la Marne, a adressé plusieurs lettres au gouvernement ("Valeurs" du 10 janvier) sur les atteintes fréquentes à la langue française dont "l'absence totale de mentions en français sur l'étiquetage et le mode d'emploi de produits importés" .

En réponse à une question sur la discrimination à l'embauche dans les organisations internationales de Bruxelles, le ministère des affaires étrangères (JO Sénat 19/12) répond qu'il est très attentif à la question et qu'on ne peut "pas parler de discrimination"* . Le bureau d'UEA à Bruxelles dispose d'une liste d'offres d'emploi** où la mention " English mother tongue" est explicite... La liste complète est sur le site www.lingvo.org/eo/2/15

Comme le disait M. Schönfelder, de la représentation permanente allemande à l'Union Européenne, après la présentation en décembre à Copenhague d'un rapport sur les langues dans la future Europe élargie : "La question linguistique continue à être si délicate que l'on peut à peine l'aborder, pas plus à Copenhague qu'à Bruxelles" .

Nous avons cru lire dans certaines réponses ministérielles que le problème n'existait pas...

J.H.

P.S.: Raymond Boré, nous adresse un extrait du "Bulletin européen" : "Lettre ouverte à propos de la Convention européenne", qui vous sera envoyée sur demande, où chacun est invité à s'exprimer sur le futur de l'Union et à dire ce qu'il en attend. Sites internet : < <http://european-convention.eu.int> > (débat et documents)*

<http://europa.eu.int/futurum/forum-convention> (forum et contributions) .

A défaut, écrire à : M. Valéry Giscard d'Estaing - Président de la Convention Européenne- BE Bruxelles

PLAIDOYERS POUR L'ESPERANTO

Successivement de "L'Indépendant" des 12 et 2 décembre et de "Marianne" du 6-12 Janvier 2003. Il y a lieu d'ajouter la conclusion d'un article* de Jean Saint-Rome, militant pro-européen connu dans notre région, paru dans "La Une" de Janvier : ".../... Une nouvelle digne du plus grand intérêt, l'anglais ne pouvant être que le parler de la soumission. Toutes les études en cours sur cette langue commune dont nous avons impérativement besoin, démontrent que l'Esperanto, jusqu'à présent délibérément négligé, l'Esperanto élaboré à partir de racines propres à nos divers idiomes, s'impose comme le moyen d'expression, de communication, qui répond le mieux à notre Avenir. Car ce dont l'Europe a besoin, ce n'est pas d'un outil mondialiste, mais d'une langue propre, grâce à laquelle elle pourra développer librement ses multiples cultures".

"L'espéranto langue européenne"

M. Ignace Van Enis d'Ille-sur-Têt revient sur l'article de Muriel intitulé Babel, paru le 18 novembre et concernant les 25 langues européennes : Je ne parle pas l'espéranto. Pourtant j'apprécie le mérite du Polonais Zamenhof qui a créé une langue internationale qui semble donner ses preuves. Suggérons que tous les Pays d'Europe introduisent obligatoirement l'espéranto comme première langue étrangère dans toutes les écoles : dans quelques décennies, la plupart des problèmes linguistiques seront résolus et l'Union européenne sera consolidée. Il n'y aura plus de domination culturelle d'aucun pays, juste un dialogue efficace.

"Il y a un problème linguistique"

M. Jean Amouroux de Perpignan constate mais garde espoir : Le billet de Muriel du 18 novembre consacré au casse-tête des langues pour les travaux européens est matière à réflexion. Muriel écrit fort justement si "aujourd'hui l'Union européenne se décline en 11 langues officielles, la situation va empirer avec l'élargissement à 13 ays et presque autant de langues. La langue choisie (...) c'est l'anglais. L'Europe va ainsi contribuer à renforcer la domination culturelle anglo-saxonne". J'ajouterai que cette sournoise suprématie linguistique induit une hégémonie culturelle et autorise une aliénation de la mosaïque des identités au profit d'une pensée unique anglo-saxonne, voire "étasunienne". En 1861 Frédéric Mistral écri-

vait en provençal aux Troubadours catalans : "Qui garde sa langue détient la clé qui le libère des chaînes". Qu'en est-il des langues et des identités régionales ? Nous sommes dans le même cas de figure mais à l'échelle du monde. Je souligne le courrier du 19 juillet adressé par M. Pat Cox, Irlandais, président du Parlement européen, à un groupe espérantiste périgourdin : "La Commission européenne a créé un groupe de travail chargé d'examiner les projets "Neighbour" et "Relais" relatifs à l'apprentissage de l'espéranto et la mesure dans laquelle il peut être utilisé comme langue intermédiaire (...)" Il s'agit d'une prise de conscience quant au problème et sa solution équitable. Je suis effaré d'entendre souvent qu'il n'existe pas de problème linguistique puisqu'il y a l'anglais ! (...) Ce charme trompeur relève du conditionnement des esprits et sert un but autre que linguistique. En prendre conscience n'est pas si mal mais il est urgent d'agir.

L'espéranto, seul espoir de la communauté européenne

Imposer l'anglais comme seule langue officielle de l'Europe est une forme de colonialisme.

L'égalité affirmée de toutes les langues de l'Union européenne va rapidement devenir un problème insoluble avec l'arrivée prochaine de nouveaux membres, ne serait-ce qu'à cause du coût exorbitant des traductions de chaque langue vers chacune des autres. Dans les faits, un puissant courant, qui ira en s'amplifiant, pousse à adopter d'ores et déjà l'anglais comme unique langue commune de l'Union européenne. Ce qui suppose de rendre obligatoire et prioritaire l'étude de l'anglais dans toutes les écoles de l'Europe. Certains se réjouissent d'avance de ce futur bilinguisme, en soi très enrichissant, sans en mesurer le danger mortel pour la diversité de nos cultures. En effet, ce bilinguisme est déjà au départ unilatéral, les anglophones n'ayant nul besoin d'apprendre une autre langue. Il deviendra rapidement par la suite un bilinguisme inégal,

de type colonial. Les Européens garderont, bien sûr, l'usage «privé» de leur langue nationale entre concitoyens. Mais tout ce qui concerne la vie officielle de l'Europe et toutes les affaires importantes (politiques, économiques, juridiques ou scientifiques) se traiteront progressivement en anglais, l'obligation d'une traduction dans une autre langue cessant même peu à peu. Les meilleures écoles –celles qui sélectionnent les élites– seront amenées à enseigner non plus l'anglais, mais en anglais. Les élèves européens choisissent déjà en priorité absolue l'anglais au détriment des autres langues nationales. Celles-ci, malgré un fort attachement affectif qui se perpétuera, vont acquérir peu à peu, dans les faits, un statut de langue inférieure, non indispensable, comme ça a été le cas pour les langues régionales en France. Leur usage «international» sera réduit au minimum. Cette évolution sera, évidemment, plus ou


moins rapide. Mais avec le choix de l'anglais comme langue commune de l'Europe, elle est inéluctable, à plus ou moins brève échéance. Ce n'est pas, bien sûr, la valeur de la langue anglaise en soi qui est en cause, mais son monopole et le fait qu'elle soit, dans la pratique, un puissant allié de l'hégémonie culturelle et économique américaine, et même militaire ! Or, nous pensons qu'une autre solution est possible : l'espéranto. Cette langue qui s'apprend 10 fois plus vite que l'anglais. L'espéranto existe depuis plus d'un siècle. Il a son histoire, sa littérature, sa poésie, sa culture. Les scientifiques, qui l'utilisent, apprécient sa clarté et sa précision. La mise en œuvre de l'espéranto pourra se faire rapidement et à peu de frais. Il est regrettable que cet outil exceptionnel soit si peu connu et si dénigré, en général par pure ignorance ■
Etienne de Saint-Laurent,
Plestin-Les-Grèves



**BONVENON AL GÖTEBORG
- GOTENBURGO**
kaj la 88-a Universala Kongreso de
Esperanto 26 julio - 2 aŭgusto 2003



Kongrescentro meze de la urbo



Ĉio estas en promena distanco

Kapacitoj de hoteloj en Göttenburgo

5-minuta promendistanco	2100 ĉambroj
20-minuta promendistanco	3300 ĉambroj
Sume	5400 ĉambroj

30 minutojn per tramo/buso	3200 ĉambroj
Sume	8600 ĉambroj

Universala Kongreso en Svedio (la venonta okazos en Ĉinio !)

Esperanto-France proponas du grupvojaĝojn :

- 1) Al la kongreso : foriro de Roissy vendredon la 25an de julio je 12h45 (Air France), alveno en Göttenburgo je 15h05 (pli malpli), instalado en la 4stela hotelo, restado kun matenmanĝoj dum la kongresa semajno - Reveno dimanĉon la 3an de aŭgusto (Air France -18h en Parizo)
- 2) Same + turisma semajno poste (kompleta pensio por tiu aldona semajno, tristelaj hoteloj, francparolanta gvidisto) Buse al Stockholm, la sudo de Svedio kaj Kalmar, la insulo Ŝland, Malmö, Danio : Kopenhago, reveno al Göttenburgo. Flugo al Parizo dimanĉon la 10an de aŭgusto vespere .

La programo kun tarifo estas havebla de UFE, de SFS* aŭ trovebla en la ĵamara "Monde de l'Espéranto".

Ekzistas buslinio "Eurolines" de Parizo al Göttenburgo . Pluraj esperantistoj deziras kumveturi al la UK . Informoj ĉe SFS.

DISE

Afriko : "adopti lernejanon".

Agado Lernejo - Lernejoj por evoluo

La itala organizaĵo "Changamano" ("solidareco" en la sùahila lingvo) peras la lernejan adopton de infano en Tanzanio, kiu per 50^E ricevas ĉion necesan por viziti lernejon dum unu jaro (t.e. pago de la enskribiĝo, lerneja uniformo, kajeroj, libroj, skribiloj). La mono estas transdonata al la infanoj pere de tanzana esperantisto kunlabore kun eùropa pastro, sed la infanoj ne estas elektataj laŭ religiaj kriterioj. Ili estas elektataj de loka komitato, en kiu partoprenas la lernejestroj, reprezentantoj de la gepatroj, la vilaĝestro kaj loka esperantisto). Ĉiu esperantisto, kiu donacas 50^E al la konto ĉe UEA (cgmn-g) rajtas adopti (t.e. helpi de malproksime) unu infanon en la regiono Mara. Oni povas, krome, morale sindevigi helpi difinitan infanon dum la tuta lerneja periodo (7 jaroj). En tiu kazo oni pagos po 50^E jare kaj ricevos ĉiujn detalojn de la helpata infano. Al la infano estos samtempe donacita lernolibro de E^o kaj kopio de libreto pri E^o, kiu espereble estos legata de la gepatroj kaj instruistoj. Kontribuoj estu akompanataj de informoj pri la donacantoj (nomo, adreso, ktp). La informoj estas sendeblaj per www.changamano.org

Memorinda Anglo :

Eble vi renkontis lin en nia regiono antaŭ 18 jaroj (rondvojaĝo organizita de UFE)... aŭ en Grésillon antaŭ 50 jaroj, ĉar li estis la unua Brito tie... aŭ en iu E^o-kongreso. Li multe verkis, instruis kaj prelegis en E^o. Profesie Frank Buckley estis advokato kaj lia kunportita peruko rikoltis grandan sukceson dum la rondvojaĝo. Ĉijare en junio li festos sian 89an datrevenon kaj 70 jarojn kiel esperantisto. Li ĝojos kaj antaŭdankas, se je tiu okazo vi bonvolos sendi mesaĝon por la "muro de E^o", kie pendos la diversaj mesaĝoj ricevita, vidotaj de la vizitontoj kaj ĵurnalistoj Lia adreso : 620 Filton Avenue - Bristol - BS34 7LD Anglio



Nova adreso : KEA (Kataluna Esperanto Asocio) havas novan poŝtadreson : KEA - Apartat 1008 08200 Sabadell . Llibert Puig estas ankaŭ kontaktebla ĉe : kea-kasisto@esperanto-ct.org

"English-only Europe ?" - Nuranglalingva Eùropo

estas nova libro de Robert Philippon (eldonejo Routledge/Londono - ISBN 0-415-28807-X), la aŭtoro de "Linguistic Imperialism". Ĝi montras la multflankajn minacojn, kiujn estigas la nur-angla E. kontraŭ egaleco kaj diverseco. Ĝi ankaŭ enhavas 4 paĝojn pri E^o kaj mencioj pri ĝi aperas sur 7 aliaj paĝoj.

La eta Princo : la libro de Saint-Exupéry estas legebla surrete kun belaj ilustraĵoj kaj agrabla muzikfona.

<http://www.utopia.com.br/esperanto/eta/>

Invito al Esperanto estas nova lernolibro por infanoj (7-9jaraĝaj). Abundas desegnaĵoj kaj skemoj-ŝablonoj. La libro estis eldonita en Moskvo-Taŝkento, pro tio estas klarigoj en la rusa por la instruistoj sed ofte akompanas traduko en E^o, do la lernolibro estas uzebla internacie, por infanoj aŭ komencantoj.

Pasporta Servo 2003 estas finkompilata kaj haveblas en februaro. Ĝi listigas 1286 gastigantojn en 80 landoj (10% pli ol antaŭ 2 jaroj). Informoj troveblaj surrete <http://pasportaservo.org>


libroj

F. Buckley kun ornamita biciklo en Baugé en 1953 okaze de festotago en la vilaĝo.



Katalunio : Interesa kvarpaĝa artikolo pri la kataluna lingvo, **redaktita de Hektor Alos I Font, aperis en la decembra n^o de "Monato". Se la kataluna estas la plej vaste parolata neŝtata lingvo en Eùropo, kun du dialektaroj (la orienta kaj la okcidenta), ĝi ankaŭ konkurenças por la samaj funkcioj la francan norde kaj la hispanan sude. 75% de la nuna loĝantaro de Katalunio almenaŭ parte devenas de la 20jarcenta enmigrado. Laŭ socilingvistikaj esploroj ne pli ol 51-52% de la loĝantaro estas katalunlingva kaj 60% de la homoj (15-24-jaraĝaj) parolas hispane kun la patro. Do, la evoluo ne estas tre favora al la kataluna lingvo. Plie ĝi devas nun skermi kun novaj situacioj : la teknologia revolucio, la alveno de novaj enmigrantoj el Magrebo kaj Sud-Ameriko. Daŭra evoluado...

Generacia lingvoŝanĝo



ICI ET LÀ...**Petites annonces gratuites :**

Info donnée par Lucien Angevin (Le Cailar)

AV Annonces vertes est "le journal des annonces gratuites pour les particuliers". Il est hebdomadaire et coûte 1^E80 (une soixantaine de pages, le vendredi). Il suffit de téléphoner son message avec son n° de téléphone (au 04 67 60 76 76), par fax au 04 67 60 41 42, par courrier BP 2070 34025 Montpellier cedex 1 ou courriel : annonces @annoncesvertes.com. Des annonces payantes sont aussi possibles (avec photo, en 1^o page).

Formule intéressante pour annoncer l'espéranto.

Rubriques possibles; 733 méthodes, 764 voyages, 790 divers

Bandes autocollantes avec l'inscription

"L'Europe a une monnaie unique, l'Euro/ Il lui faut une langue commune, l'Espéranto". Dimension 45x9cm (6^E) ou 70x8,5cm sur fond transparent avec lettres inversées (7^E50). Chez "Réinsertion et E°", 26 Rue Enclos Fermaud 34000 Montpellier.

Brochure touristique en Esperanto sur l'Aude :

"Aude, lando de la Kataroj" décrit les principaux lieux touristiques : Canal du Midi, Carcassonne... avec illustrations en couleurs. S'adresser au CDT 11855 Carcassonne cedex 9 (tel 04 68 11 66 00 - 06 81 15 13 55)

Grands voyageurs :

Maryvonne et Bruno Robineau ne sont plus inconnus à présent. Ils ont écrit "8 ans de voyage autour du monde" et présenté leur diaporama à de nombreuses occasions. Ils vous proposent maintenant le récit de leur dernier voyage dans les Carpates de Roumanie (avec deux ânes porteurs). Le livre "Sur les sentiers des Carpates" -230 pages, 70 photos- peut être commandé à : Le Moulin Boireau - 49270 Landemont Prix : 20^E. Remise de 8% pour 2 livres, 10% pour 3 livres... Frais de port : 1 livre 3^E, 2 : 4^E50, 3 : 5^E10...

Rachel Prual et David Cholet (Vendée) ont terminé l'été dernier leur périple de deux ans en stop au tour du monde - 36 pays visités... par l'espéranto. Ils sont revenus avec 5000 diapositives et préparent trois montages différents.

Académie de la Carpette anglaise

Elle a décerné son prix annuel à Jean-Marie Colombani, directeur du "Monde", pour la publication d'un supplément hebdomadaire en anglo-américain, sans la moindre réciprocité et à l'exclusion de toute autre langue. Un prix spécial à titre étranger a été décerné à Romano Prodi, président de la Commission européenne, qui ne manque aucune occasion de promouvoir la langue anglaise comme langue unique au mépris des règles communautaires.

En espagnol : "El Pais" a fait paraître un article au sujet de ladite Commission : Cómo entenderse en la Unión Europea / La UE debate un proyecto para

reducir el coste de intérpretes entre 21 lenguas oficiales". Document* à demander à SFS.

Enseignants espérantistes :

Ils sont invités à rejoindre ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) dont le programme Interkulturo permet, grâce à l'école virtuelle "Tibor Sekelj" de mettre en rapport des classes de collèges dans le monde. Les membres d'IleI reçoivent la revue IPR (Internacia Pedagogia Revuo) 4 fois par an, devise : "Florigi per edukado". Cotisation de 14^E50, chèque au nom de GEE à envoyer au trésorier Armand Hubert 13, chemin de la Solitude 57200 Sarreguemines.

BOURESSE (86) : Kvinpetalo

(Inf. Kvinpetalo 05 49 42 80 74 tarifs, horaires,...)

18 au 22/02/2003	Cours pour enfants et adultes (avec M.H. Sautet, J. Turbillon)
25/02 au 1/03/03	Préparation au Kapableco (oral et écrit avec G. Lagrange)
14 au 18/04/2003	Initiation et pratique du yoga (avec A. Plutniak et K. Smideliusz)
29/04 au 3/05/03	Problèmes linguo-scientifiques et grammaticaux dans la nouvelle édition du PIV avec M. Duc Goninaz
Du 8/05 au 11/05	Stellan Engholm et la petite revue
Du 29/05 au 1/06	Botanique, observation et terminologie

Vacances d'été en Bretagne :

La semaine de Plouézec qui regroupe environ 150 personnes en est à la 7^o édition. Dates 2003 : 16-23/8 Cours le matin (3h); l'après-midi, cours pour enseignants, théâtre, chorale, yoga, informatique et tourisme. Logement en centre de vacances, en camping ou chez l'habitant. Bulletin d'adhésion à SFS* ou Louise Rigault 4, Rte de Kervor 22470 Plouezec Tel: 02 96 22 70 13.

Pour les jeunes : Jefo organise presque aux mêmes dates une "festo" à Paimpol pour découvrir la culture celte dans une ambiance festive. Ne manqueront ni festnoz, ni crêpes, ni galettes, ni chouchen, ni même un cours de breton. Kenavo ! (gis !). Pour contact : <http://festo2003.free.fr>

Week-end en montagne pour les jeunes :

Lieu : le Vercors (près de Grenoble) -dates : 8-12 Mai Au programme : randonnées en montagne. Ne pas oublier de bonnes chaussures de marche et deux repas de midi. (programme à SFS *)


Congrès des cheminots espérantistes (ouvert à tous)

Du 14 au 21 mai à Collonges-la-Rouge (mêmes dates que la semaine de Vias !); nombreuses excursions : Collonges, Turenne, Lascaux, Rocamadour, promenade en bateau sur la Dordogne, etc. Programme à SFS ou 01 48 53 05 52 / 02 43 21 16 39.

FIKCIA RAKONTO
RESPONDECAS PRI LA TEKSTO...LA VERKINTO.

LETERO EL USONO

Amata katineto,
 Mia karulineto,
 Flor' de mia pasio, k.t.p.



Jam de unu jaro ni apartiĝis.

Ekde tiam, mi tiel enuas pri vi, ke mi ne plu manĝas, ne plu dormas, ne plu lavas min kaj ploras tage kaj nokte !

Tamen mi fartas tre bone, escepte de kelkaj etaj misfunkcioj : mi kaptis kanceron, aidoson kaj tuberkulozon . Do mi perdis mian laboron, mian domon kaj mi ne plu havas monon . Krome mi falis, pro ebrieco, tra la fenestro de la kvina etaĝo kaj miaj du kruroj rompiĝis, ankaŭ mia kranio, kaj unu okulo krevis . Mi ĝuas bonan ŝancon, ke restas al mi la alia . Do, mi estas kuŝanta, duone morta, sur la trotuaro . Afablaj pasantoj traserĉis min, prenis mian monon kaj transportis min en hospitalon .

Sed en tiu lando de libereco, Usono, la hospitaloj estas liberaj ne kuraci la malriĉulojn . Do, la ĥirurgo demandis min : "Ĉu vi havas monon ?" -"Ne !" -"Ĉu vi havas veturilon ?" -"Jes !" -"Je kia prezo ?" -"Dudekmil eŭroj !" -"Bone, tio sufiĉos por unu semajno . Subskribu tiun paperon !"

Mi subskribas paperon por doni mian veturilon al la ĥirurgo kaj tiu-ĉi endormigas min . En tiu lando de libereco, la ĥirurgoj rajtas tranĉi ĉion, kion ili volas . Do, kompreneble, li tranĉis . Kaj mi vekigis sen mono, sen veturilo kaj sen kruroj . Sed tiu honesta ĥirurgo ne ŝtelis miajn tranĉitajn krurojn .

Li redonis ilin al mi, kiel memoraĵo, en plasta sako (li donis la sakon senpage) .

Post unu semajno, matene, tri fortaj flegistoj venas diri al mi : "Via kurac-tempo estas pasinta . Vi devas foriri" -"Sed... mi ne estas resanigita !" -"Ne gravas ! Vi devas eliri ! En nia lando de libereco, oni rajtas eliri sen esti resanigita !" Bone . Ŝajnas al mi, ke io ne taŭgas ! Sed oni devas ĉiam ĝui liberecon, ĉu ne ?

Ili prenas mian brakhorloĝon kaj miajn ŝuojn (kiujn mi ne plu bezonos) por pagi, kion mi ankoraŭ ŝuldas : la matenmanĝon . Ili portas min ĝis la pordego de la hospitalo kaj ĵetas min eksteren . Kompreneble, en tiu lando de libereco, oni rajtas ĵeti la neutilajn malsanulojn .

Do, jen mi, rampanta sur la stratoj kaj sur la manoj, serĉante ion por manĝi, ĝis mi renkontas bandon de afablaj, gajaj uloj, urinantaj kontraŭ muron . Ridante, ili alparolas min : "He, vi, duonulo, kien vi vojaĝas tiumaniere ? Ĉu vi vizitas Usonon ?" Ili ridegas . "Ne ! Mi vizitas rubujojn por trovi ion por manĝi ! En tiu lando de libereco, oni rajtas manĝi el la rubujoj !" -"Certe !", ili diras kaj traserĉas min por trovi monon . Ili trovas nur miajn tranĉitajn krurojn en mia plasta sako . "Diable ! Kia bela pakaĵo !" ili krias .

Bone, jen la lastaj novaĵoj .

Jen mia vivo, normala usona bela vivo, kvankam mia korpo putre malbonodoras, kovrata de pedikoj kaj puloj, kiuj pikas min senĉese . Ne gravas . Tamen, pli kaj pli ŝajnas al mi, ke io ne taŭgas ĉi-tie !

Nun mi volas peti de vi, trezoro de mia koro, tre etan servon : forlasu viajn edzon kaj palacon, kaj venu ĉi-tien por vivi kun mi ! Ni geedziĝos sub la ponto de miaj amikoj kaj tiuj-ĉi pretigos por ni egan festenon de rostitaj ratoj kaj vino . Poste ni ludos amorludojn en nia bela kloako, ĉiuj kune . Se via edzo ne konsentos, ke vi foriros, mortigu lin .

Amata karulino,
 Pli bona ol la vino,
 Ĉiam mi amos vin,
 Ĉiam vi amos min,
 Kara friponineto,
 Belega bovineto, k.t.p....

Via amoramanto,

Vito


- P.S. 1) Se vi venos, kunportu vian riĉecon .
 2) Se vi ne venos, ĝin sendu al mi !



Guy Carquet - Béziers

KRUCVORTOJ

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

Solvoj de la n° 162:

Horizontale : I sinkretism II aristofano III teni-mon
 IV ine-ato-bo V sevil-blat VI fo-rigli VII fiul -ksi
 VIII kvadriiceps IX celobionat X irkja -lodo
Vertikale : 1 satisfakci 2 ireneo-ver 3 ninev-falk
 4 ksi-iridoj 5 ri-aiiurba 6 eost-glii 7 tf-obl-col
 8 iam-likeno 9 snoba-spad 10 monoteisto

Mis-PIV (PIV = Plena Ilustrita Vortaro, denove eldonita en 2003). Atentu la akcenton
 aĉeti = konduti nur iom maldece
 aventuro = alta silo por storado de porĉevala nutraĵo
 baleno = interno de amuzejo
 barbaro = grupo de barbuloj
 ĉampano = nutraĵo bakita el antilopa ledo
 fakiro = promeno de spertulo
 fazoleo = oleo preta post kelkaj etapoj
 folio = lando de frenezuloj
 irlando = lando sena de transportiloj
 juglando = lando regata de tirano
 kamparano = malgranda saltanta besto, kiu loĝas en senarabaj, herbaj lokoj
 karismo = emo al prez-altigo
 = movado por esti ĉarma
 katetero = aero elspirita de kato
 kondomo = interkonatiĝa hejmo
 kurteno = klopodo persisti pri kurado

HORIZONTALE

- I) - Praa epok(o).
 II) - Mediteranea havenurb(o).
 III) - Vivas per libroj / s : Eŭropano.
 IV) - « Marfrukt(o) » / Nevola distanc(o).
 V) - 6 - 1 / Mezepoka Mazdao.
 VI) - Parte varti bebon / Ej(o).
 VII) - Nerekoneblec(o).
 VIII) - s : Ligilo / « Vekil(o) » / Zoofino.
 IX) - Antikva Franca Regiono.
 X) - Oceaniparto.

VERTIKALE

s : sone

- 1) - Senlanda landan(o) ?
 2) - Fama versilo.
 3) - Arme(o) / s : Ejo / s : Funkcio.
 4) - Parazitoz(o).
 5) - Eŭropa montar(o) / Senkompate.
 6) - (O)ro, ekzemple / Mise klin(i).
 7) - Komuniki / Duonkara.
 8) - s : Returnita dono / Vivelement(o).
 9) - Dispecigita perdriko. / s : Parto.
 10) - Skota apartaĵo / Mezurunuo.

BOPARO

lampiro = procesio kun lampionoj
 = marŝado de lumigiloj
leono = centono de rumana monunuo
malaro = fuŝita ario
marmito = legendo pri Neptuno
martelo = angla biero fabrikita en la tria monato de la jaro
migreno = interna organo de rusa aviadilo
mongolo = golo enlasita de subaĉetita futbalisto
mustango = danco de ronguloj
poltrono = de reĝo en Varsovio
poluro = bizono vivanta en Pollanda arbaro
poplito = kuŝejo de grekortodoksa pastro
riparo = parto de skeleto
romano = loĝanto de la itala ĉefurbo
satelito = aristokrato neniam spertinta nutraĵmankon
skotero = korpoparto de Edinburga civitano
Teodoro = aromo de populara trinkaĵo
veluro = bizono glitanta per akvo-skio

La venonta SFS aperos komence de aprilo...se vi bonvolos, tio estas se vi bonvolos sendi viajn kontribuojn antaŭ la limdato. Ne forgesu, ke tempo estas bezonata por tajpi, presi, ekspedi kaj porti al vi la bultenon.
 Limdato = la 20a de marto. Redaktas SFS : Jean Hénin -Beauregard- Route de Montcayroux
 48500 La Canourgue Telefono/telekopio : 04 66 32 86 36 Rete : Jean.Henin@wanadoo.fr